PILO-PRESS
Internacia
Informservo

N-ro 19/1976 - 10 majo 1976
Aperas ĉiusemajne

Partoprenu la novan konkurson de Pola Radio!

Legu detalojn en la anonco de paĝo 4.

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



## Pli ol 2 400 vizitantoj ĉe la Esperanto-Ekspozicio

## 313 personoj partoprenis provlecionojn

Augsburg (pp) - Dimanĉe, la 9-an de majo, je la 19-a horo, finiĝis la Germana Esperanto-Ekspozicio Augsburg 1976 en la urbodomo de la Fugger-urbo. Ĝis la lasta minuto regis vigla intereso por la ekspozicio. Vizitis ĝin entute 2 421 personoj. 313 personoj, junaj kaj maljunaj, kun granda intereso partoprenis en provlecionoj laŭnombre 49. Fina raporto kaj komento pri la ekspozicio aperos en la venonta numero de Pilo-Press.

## Zamenhof-strato en Augsburg

Dum la Esperanto-Ekspozicio la urba konsilantaro de Augsburg decidis nomi loĝstraton en Augsburg laŭ d-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto. La konsilantara kunsido okazis en la sama urbodomo, kie estis instalita la ekspozicio. Ĉiu konsilantarano, la ĉefurbestro kaj urbestro, oficistoj k. a. kelkfoje trapasis la ekspoziciejon kaj multaj sin enskribis en la libron de la vizitantoj de la ekspozicio, i.a. ankaŭ la ĉefurbestro Hans Breuer, la honora protektanto de la ekspozicio.

## La francaj socialistoj kontraŭ Esperanto?

En sia prelego pri "La lingva problemo en la eŭropa kunlaboro" Karl Heinz Müller, Augsburg, membro de la bavara parlamento, konstatis, ke dum kunsido de la Socialista Internacio la socialdemokrataj partioj de Svedio kaj FR Germanio subtenis la proponon de la Itala Socialdemokrata Partio pri enkonduko de Esperanto en la internacian rilatojn de la Socialista Internacio. Sed la francaj socialistoj voĉdonis kontraŭ la propono!

La prelego okazis en la urbodomo de Augsburg kadre de la Esperanto-Ekspozicio laŭ invito de Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft. Bedaŭrinde la intereso por tiu prelego inter la publiko de Augsburg ne estis granda, kio certe ankaŭ ŝuldiĝas al la fakto, ke ne aperis gazetoj pri la presista striko kaj ke la prelego okazis sabate vespere.

## Enketado inter la ekspoziciaj vizitantoj

Pilo-Press faris al 100 vizitantoj de la Esperanto-Ekspozicio en Augsburg 6 demandojn pri Esperanto kaj la lingva problemo. Ĉi-sekve ni publikigas la demandojn en Esperanto-traduko kaj la rezultojn laŭ procentoj:

Demando 1: Ĉu vi sciis antaŭ la vizito de la ekspozicio, kio estas Esperanto?

Respondoj: Jes: 82 % Ne 18 %

Demando 2: Kia estis via sinteno al Esperanto antaŭ la vizito?

Respondoj: Pozitiva: 57 % Negativa: 8,5 % Sen opinio: 34,5 %

(Daŭrigo sur p. 2)

Enketado (daŭrigo)

Demando 3: Se vi antaŭe ne sciis, ĉu vi nun post rigardo de la ekspozicio scias, kio estas Esperanto?

Respondoj: Jes: 77 % Ne: 23 %

Demando 4: Ĉu la ekspozicio ŝanĝis vian sintenon al Esperanto?

Respondoj: Jes: 39 % Ne: 55 % Sen opinio: 6 %

La sinteno de ĉiuj personoj, kiuj respondis per "jes", fariĝis pli pozitiva!

Demando 5: Ĉu vi jesas la neceson kaj utilon de komuna dua lingvo por la internaciaj rilatoj?

Respondoj: Jes: 95 % Ne: 5 %

Demando 6: Ĉu vi opinias, ke Esperanto povus esti ĉi tiu komuna dua lingvo?

Respondoj: Jes: 74 % Ne: 12 % Sen opinio: 14 %

*******************

Nova estraro de AGEI

Dum la kunsido de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj en Eindhoven estis elektita nova estraro: Prezidanto Hermann Behrmann, Kasisto S-ro Trimborn, Paderborn; estraraj membroj: Dr. Kasselmann kaj Günther Doliwa.

Esperanto sur meza ondo de Vieno

La venonta Esperanto-elsendo de Radio Vieno sur meza ondo 203 m (regiona programo) okazos la 25-an de majo, je la 18,35 horo. Temo: La unua aŭstra longdistanca migradvojo de Schulrat Ernst Rixner.

49-a Kongreso de SAT

Parizo (pp) - La SAT-Gazetarservo informas: "La 49-a internacia kongreso de S.A.T., kultura kaj interhelpa mondorganizo de laboristaj esperantistoj, okazos en Gotenburgo, Svedio, de la 24-a ĝis la 30-a de julio 1976.

Unuopaj esperantistoj, societoj, neesperantistoj en Gotenburgo kaj en la lando interesiĝas kaj aktive apogas la Organizan Kongresan Komitaton. Inter aliaj: Olof Palme, ĉefministro; Göran Axell, prezidanto de ECO (Centra Organizo de Sindikataro en Gotenburgo); Bengt Gustafsson, prezidanto de la Sveda Asocio de UN; Einar Dahl, eksmembro de la sveda parlamento kaj esperantisto. La kongresanoj vojaĝos senpage en la urbaj tramvagonaroj. Sveda Poŝta Administracio pretigas apartan poŝtan stampon por la kongreso.

En siaj laborkunsidoj la kongreso pritraktos la vivon, gvidadon kaj agadon de la Asocio, kiu celas utiligi praktike Esperanton, interalie por faciligi la internaciajn rilatojn inter laboristoj kaj laboristaj movadoj. En la kadro de la kongreso mem estas antaŭvidita renkontiĝo de la kongresanoj kun la svedaj sindikatoj.

La programo de la semajno havos ankaŭ tre valorajn partojn kulturajn: tuttaga ekskurso al norda Danio; duontaga ekskurso al la arkipelago norde de Gotenburgo; festaj aranĝoj, teatro, prelegoj, muziko kaj arto. Informojn petu de: 49-a Kongreso de S.A.T., Ivar Paulsson, Algatan 3, S-171 33 Solna, Svedio."

Esperanto en Radio

Varsovio. Dimanĉe, la 9-an de majo, je la 16,30 horo, okazis la 10 000-a dissendo en Esperanto de Pola Radio, kiun mi aŭskultis en la urbodoma halo de Augsburg dum la Germana Esperanto-Ekspozicio. Per laŭokaza felietono la Esperanto-redakcio memorigis tiun unikan datrevenon. Pilo-Press kore gratulas al la Esperanto-Redakcio!

La Esperanto-Redakcio de Varsovio dissendas nun la novan programfolion por la periodo majo - novembro 1976. Interesuloj petu ĝin de Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.

Pola Radio dissendas trifoje ĉiutage en Esperanto laŭ jenaj horoj kaj ondolongoj:

| | |
|---|---|
| 6,oo horo ondolongoj: | 31 m (9 540 kHz), 49 m (6 135 kHz), 49 m (5 995 kHz), 75 m (3 955 kHz), 200 m (1 502 kHz) |
| 16,30 horo ondolongoj: | 31 m (9 675 kHz), 31 m (9 540 kHz) 41 m (7 145 kHz) |
| 22,30 horo ondolongoj: | 49 m (6 135 kHz), 49 m (5 995 kHz), 75 m (3 955 kHz), 200 m (1 502 kHz) |

La horoj laŭ mezeŭropa tempo!

Nuntempe okazas nova konkurso de Pola Radio. Bonvolu legi la demandojn kaj partoprenkondiĉojn sur paĝo 4. Partoprenu la konkurson!

Ekde Pasko Vatikana Radio en Esperanto

Laŭ informilo de la Esperanto-Redakcio de Radio Roma Vatikana Radio unuafoje disaŭdigis Esperanto-anguleton en la kadro de la programo "Kun vi en la nokto" en la nokto inter la 17-a kaj 18-a de aprilo, je noktomezo laŭ grenviĉa tempo. Temis pri nur kelkaj vortoj, prononcitaj de s-ino Elizabeta Rzeményi-Puracchio, hungarino loĝanta en Romo.

Ekde la 25-a de aprilo, la Esperanto-anguleto estas regule disaŭdigata 30 minutojn post noktomezo (laŭ mezeŭropa tempo), sur meza ondo 196 metroj (1529 kilohercoj). Momente, la programo temas pri mallonga prezentado de la historio de Vatikana Radio; interalie, oni ankaŭ disaŭdigas la voĉon de Guglielmo Marconi. La anguleto okazas laŭ semajna ofteco, en la nokto sabate/dimanĉe.

La Esperanto-redakcio de Radio Roma opinias, ke estas absolute necese, por ke la Esperanto-anguleto daŭru, ke multaj skribu raportante pri la aŭskultado, gratulante, kaj petante senpagan ekzempleron de la plurlingva programbroŝuro, al Radio Vaticana, Città del Vaticano.

Esperanto el Vieno - nun bone aŭdebla

Bone aŭdebla nun denove estas la Esperanto-elsendo el Vieno. El la ĉi-semajna komentario de d-ro Alfred Macher ni citas:

" Jam dum kelkaj monatoj disvastiĝas pesimismo, ĉar ĉio malboniĝas: la vetero, la ekonomia situacio, la politikaj - pli kaj pli ofte eĉ militaj - streĉitecoj. Kanceliero Bruno Kreisky, parolante en Strasburgo al la Eŭropa Konsilantaro, tamen montris optimismon. Li emfazis la ŝancojn por la Eŭropaj unueco kaj paco, kiujn la pli larĝa bazo - nome 18 nacioj - de tiu konsilantaro prezentas en komparo kun la nur 9 nacioj de la Eŭropa Komunumo....."

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

valoraj objektaj premioj

atendas la eksterlandajn aŭskultantojn de la Pola Radio, kiuj respondos al jenaj demandoj:

- Kion vi scias pri la vivo, problemoj kaj rolo de la juna generacio de la nuntempa Pollando? Kiel oni aprezas en via lando la junan generacion kaj kiajn perspektivojn oni ligas kun ĝi?

- Kian signifon havas, laŭ via opinio, la internaciaj junularaj aranĝoj? Ĉu vi partoprenis en tiaj - se jes, kiajn impresojn vi elportis?

- Kiel vi aprezas la disaŭdigojn de la Pola Radio, dediĉitajn al la problemaro de la juna generacio? Je kiuj demandoj /temoj/ kaj kiel oni devus pliriĉigi tiujn ĉi dissendojn?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn oni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 15-a de junio 1976 j. /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultojn ni anoncos en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 30-an de junio 1976 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras sukceson en lotado de la premioj.
Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio dissendas trifoje ĉiutage en Esperanto!

Pri la horoj kaj ondolongoj bonvolu legi sur paĝo 3.